



## PILO-PRESS

Internacia

Informservo

## Partoprenu en la

nova konkurso de Eldonanto/Herausgeber:

Pola Radio!

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

Vidu la anoncon

sur paĝo 4!

N-ro 42/76 - 26 okt 1976

Aperas ĉiusemajne

### Fervojistoj jarkunvenis en Paderborn

Paderborn (Geri/pp) - Dum la semajnfino de la 15-a ĝis la 17-a de oktobro Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) aranĝis sian 20-an jarkunvenon en Paderborn. Al la invito sekvis pli ol 130 personoj, el kiuj multaj jam vendredon alvenis por ĉeesti la publikan informvesperon aŭ la babilan rondon en la kunvenejo "Paderhalle".

La ampleksa programo devigis bedaŭrinde al samtempaj aranĝoj. Oni do devis elekti ĉu prefere inspekti la lernmetodan instituton FEoLL, ĉu agrable promeni sub lerta gvidado tra la urbo de la ducent fontoj de la rivero Pader, ĉu sekvi la devon de estraro kaj komisiitoj labor-kunsigni. Ĉiuj tri grupoj renkontiĝis antaŭ la pitoreska urbdomo pro subĉiela koncerto de la loka blorkestro fervoja.

Post oficiala akcepto fare de la urbestro por estraro kaj komisiitoj kaj komuna tagmanĝo tri aŭtobusoj atendis por ekskurso tra la Teŭtoburg-arbaro.

La festvespero aparte bone sukcesis ĉi-jare, ne nur ĉar oni evitis longan vicon de salutparoladoj. Kun la Mozart-uverturo por "La Sorĉa Fluto" komencis la fervoja orkestro el Essen kaj la profunda baso de Walter Lange (Herzberg) eksonis "en tiu sankta halo". Ĉe la komponisto Mozart restis ankaŭ Alfons Hoffmann (Herzberg), tenoro, kaj Anni Wiesmann (Grafenau), soprano, en du solkantoj el "Don Giovanni" respektive "La Edziĝo de Figaro", ĉiuj akompanitaj kun perfekta adaptiĝo de Elisabeth Ritterspach (Langen) ĉe fortepiano. Belege kunsonis la tri voĉoj en terceto denove el "La Sorĉa Fluto". Kva-zaŭ dialogo inter tenoro kaj fortepiano estis la kanto de l'alaŭdo el "La Gajaj Virinoj" (Nicolai) kaj bas-arjo el la sama verko memorigis pri "Knabet' je l' patrina mam". Ni eksciis el "Don Pasquale" (Donizetti) kiel virinoj "forfrandas virajn korojn kun granda apetito" kaj en sopran-tenora amodueto el la sama opero kortuŝe eksonis, kiel "feliĉigas la vorto..". Ankaŭ vira ĥoro partoprenis en la valora programo per du esperantlingvaj kantoj: la ĥoro de la malliberuloj el "Nabucco" (Verdi) "Vin hejmlandon ni arde sopiras..." kaj la Schubert-kanto "La Gondolisto". La orkestro metis ritmoplanan firpunkton sub tiun inde-solenan festprogramon, al kies aktivaj kontribuintoj dankon esprimis floroj kaj aplaŭdo de pli ol tricent geaŭskultantoj. - Agrabla dancado kaj tombolo rondigis la vesperon kaj mallongiĝis la nokton.

En la jarraporto dum la dimanĉa matineo GEFA-prezidanto Joachim Giessner alvokis al aktiva membrovarbado. Salutis reprezentantoj de fervojaj sindikatoj, de IFEF kaj GEA, sed aparte varmajn vortojn trovis honora IFEF-prezidanto de Jong (Amsterdam) pri sia posteulo Giessner, kiu apud la ampleksa IFEF/GEFA-laboro trovis ankoraŭ tempon kaj energion por esperantigi ĉiujn kantotekstojn aŭdigatajn dum la festvespero. Hermann Behrmann interese parolis pri la laboro de la "Instituto por esploro kaj evoluo de modernaj instru- kaj lernmetodoj" demonstrante la lernmaŝinon "Robbimat".

La ekspozicio "Vojoj al la mondo" en la vestiblo de la kunvenejo altiris publikan atenton al tiu aranĝo, pro kies glata disvolviĝo meritas grandan dankon precipe s-ino Lawerino kaj d-ro Kassermann, ambaŭ el Paderborn.

## Esperanto en Radio

Varsovio. La Esperanto-Ekspreso disaŭdigis interesan sonraportajon pri la 19-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso en Szcecin de redaktoro Andrzej Pettyn. La kongreso malfermis la prezidanto de PEA, S. Swistak, kiu tamen ne plu kandidatiĝis por funkcio en la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio. Novan prezidanton, ĝeneralan sekretarion, vicprezidanton ktp. la nove elektita ĉefa estraro elektos en kunsido la 31-an de oktobro. Al la ĉefa estraro i.a. apartenas Andrzej Pettyn (informado) kaj Jerzy Uspieński (kunlaboro kun eksterlando). Salutvortojn al la kongreso direktis la vojevodo de Szcecin, kiu varmkore salutis la alvenintajn por la kongreso vicprezidanton de UEA, Werner Bormann kaj delegaciojn de la frataj socialismaj landoj, Ĉeĥoslovakio, Hungario, GDR, Bulgario. D-ro Werner Bormann i.a. dankis al PEA pro la bona, parte okulfrapa laboro kiel unu ero en la internacia Esperanto-movado. Li ankaŭ gratulis al la filio Szcecin de PEA, kiu povas festi la 20-an datrevenon de sia fondiĝo. El la sonraporto ni ankaŭ eksciis, ke 22 problemaj komisionoj kaj komisiono por la koresponda instruado post viglaj debatoj kolektis preskaŭ 500 detalajn proponojn kiuj celas evoluigi la instruadon, eldonadon, informadon kaj fakan agadon. S-ro L. Kosieniak prezentis al la kongreso rezolucion apoge al la dua Stockholma apelo. - Dum la pasinta semajno la Esperanto-redakcio ricevis 221 korespondaĵojn. -

Vieno. Ĉi-sekve ni prezentas la semajnan komenton de d-ro Alfred Macher de la elsendo 16./17.10.76: "Televida raporto pri la najbara al ni Friulo, regiono multe ruinigita de ĵusaj tertremoj, montris, ke la friulanoj, kvankam ili ĉiuj estas italaj civitanoj, nostalgias pri la iama habsburga monarĥio, kies decan administracion ili laŭdas kaj kies emblemon, la duoblan aglon, ili gluas sur siajn aŭtomobilojn. Certe, nek la friulanoj, kiuj parolas apartan lingvon, al la klasika latino pli similan ol la itala, nek ni aŭstroj iel pensas pri reunuiĝo. Des malpli, ke ni havas, ĝuste nun, sufiĉe da zorgoj pro niaj slovenoj.

Parte ni mem kulpas pri tiuj zorgoj, ĉar ni ne jam plenumis la ŝtatkontrakte transprenitan devon starigi en la lingve miksitaj sudkarintia zono dulingvajn topografiajn indikilojn. Antaŭ kvar jaroj tiaj lokkaj vojmontriloj ja estis starigitaj. Sed fanatikuloj de la lingva plimulto tuj detruis ilin.

Komprenoble la slovena minoritato sentas sin malrespektata. Kaj pro la akraj tonoj aŭdiĝantaj jen kaj jen el la plimulta tendaro, ili suspektas eĉ pli grandajn maljustaĵojn. La registaro decidis finfine plenumon de la kontrakto, sed surbaze de tutaŭstria lingva kapnombrado, kiun la slovena minoritato kaj Jugoslavio malakceptas kiel teroran manovron.

Tial la registaro entreprenas tutaŭstrian kampanjon, klerigan pri la homestaj motivoj kaj de la lingva kapnombrado kaj de la nova leĝo pri la kultura minoritat-akcelado. Ni esperu, ke la menciita raporto pri la friulanoj pruvigos leciono por ĉiuj aŭstrianoj, ankaŭ por la karintiaj slovenoj, kaj eĉ pli urĝe por la lingva plimulto tie."

## Oficiala informiĝo en Romo

Sekve de struktura transformiĝo de la itala Radio-instanco RAI, oni nuntempe reorganizas ankaŭ la eksterlandan servon de Radio Roma. En ĉi tiu kadro, oni oficiale petis de la redaktoro, ke li koncize priskribu la historion, la nuntempan staton kaj la bezonojn de la Esperantoprogramo. En la referaĵo, tiucele verkita de d-ro De Salvo, oni aparte emfazis la sufiĉe altan nombron de korespondaĵoj kaj la dezirojn de la aŭskultantoj pri aliaj frekvencoj, tagoj, horoj kaj direktoj.

Radio Vatikana. La meznokta mallonga Esperanto-anguleto estis bone aŭdebla en Nürnberg, ĉi-foje oni eĉ kantis eklezian kanton en Esperanto.

Vivu Esperanto...sed ni devas klopodi, por ke ĝi vivu!

Tiu slogano estas la moto por la ĵus aperinta broŝuro "Aktivu - Progresu vojo al sukceso" de Heinz Dieter Hartig, Bremen, vigla aganto en la Bremena Esperantogrupo kaj la aranĝanto de la lernolibro "Konversacia Kurso". Ĉi-foje, H.D. Hartig prezentas al la leganto instigojn kaj konsilojn por grupa agado, por kursoj, prelegoj kaj raporto, por varbado. Ne nur la studo de nacilingvaj fakaj libroj, sed ankaŭ la propraj spertoj helpis al la aŭtoro en la verkado de tiu utila manlibro por aktiva Esperanto-aganto,

En antaŭvorto la aŭtoro klarigas la celon kaj intencon de ĉi-tiu broŝuro: "Ĉiu organizo, ĉu komerca aŭ politika, uzas la plej modernajn metodojn atingi la celon. Kaj ni esperantistoj?

Se ni volas atingi nian celon, ni devas ankaŭ utiligi la plej modernajn kaj la plej taŭgajn rimedojn!

Ili tute ne estas sekretaj! Male! en ĉiu biblioteko oni trovas literaturon pri la metodoj: gvidi kaj aranĝi okazaĵojn, paroli konvinke, instrui sukcese, propagandi celtrafe.

En tiu studaĵo vi ne trovas kompletan recepton por la sukceso - sed instigojn kaj konsilojn finfine vigligi nian Movadon.

Streĉu vian fantazion kaj konsultu la fakan literaturon! Nur helpe de la plej modernaj metodoj kaj rimedoj en ĉiu situacio ni travivos plenan sukceson!"

Bibliografiaj notoj: Aktivu - Progresu Vojo al sukceso de Heinz Dieter Hartig, Eldonejo Pilo-Press Ludwig Pickel, Nürnberg, 74,5 x 20,3 cm, broŝ., 24 p., prezo 3,80 DM

Nova volumo de Maŭ Zedong

Aperis nun la kvara volumo de "Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong", formato 16,4 x 23 cm, bind., 438 p., prezo 14,70 DM.

Homoj kaj Nomoj - kun kaj sen Renomoj

Emil Vokal, Vieno, festis antaŭ kelka tempo jubileon kiel Esperanto-parolisto de Radio Vieno: Jam dum tridek jaroj li plenumas tiun por nia afero tiel gravan funkcion, konscienc, senlace kaj lertege.

Andrzej Grzebowski, str. M. Curie-Skłodowskiej 10/3, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando, prezidanto de MONDA TURISMO, petas pri alsendo de informoj pri ĉiuj Esperanto-aranĝoj internaciaj planataj por 1977, ĝis la 10-a de novembro 1976 j., por ke la Turisma Esperanto-Kalendaro 1977 estu laŭeble kompleta.

Dum la akcepto en la urbodomo de Paderborn okaze de la 20-a jarkunveno de Germana Esperantista Fervoĵista Asocio (GEFA) Joachim Giessner, prezidanto de GEFA, transdonis al la urbestro de Paderborn, sinjoro Schwiete, la libron "Kantoj kaj Romancoj" de Heinrich Heine.

Reinold Huber, Lehre-Wendhausen, gimnazia instruisto por la angla kaj franca, volas prepari la enkondukon de Esperanto en sia lernejo per vasta informado de la geinstruistoj kaj la gepatroj.

Mirdza Burgmeister, Riga, verkis felietonon pri la "Aŭstra literaturo en Latvio", kiun Radio Vieno disaŭdigis en sia elsendo de la 23./24. 10.76.

En Brasilia fondiĝis la Esperanto-Grupo Iŝmael ĉe Brazila Spiritisma Federacio. Celo de la grupo estas la intersanĝado de libroj, leteroj, poŝtkartoj ktp. pri ĉiuj temoj, precipe pri spiritaj aferoj. Adreso: Av. L - 2 Norte - Quadra 603, Brasilia DF, Brazilo.

Stefanie Palitza, Sczcecin, LKK-prezidantino de la 19-a Pola Esperanto-Kongreso, dum la inaŭguro legis por-okazan versaĵon, kiu finiĝis jene: Sentu vin feliĉe dum solenaj tagoj - regu harmonio por pacamaj agoj Restu en memoro tre bona impreso - post la tutpollanda 19-a kongreso.

## Konkurso de Pola Radio

### 10-tagaj ekskursoj – valoraj objektaĵaj premioj

La Pola Radio anoncas novan konkurson por siaj eksterlandaj geaŭskultantoj. 10-tagaj ekskursoj kaj valoraj objektaĵaj premioj atendas la geaŭskultantojn, kiuj donos respondon al jenaj demandoj:

- 1) Kiujn polajn artiklojn oni povas aĉeti en via lando kaj kiel vi pritaksas ilin? Kiuj polaj artikloj (produktaĵoj) ĝuus tie sukceson?
- 2) Kiel vi vidas la perspektivojn de la plua evoluo de la kunlaboro de via lando kun Pollando? Kio laŭ via opinio pozitive influis aŭ povus kontribui al plivastigo de tiu ĉi kunlaboro?
- 3) Kiel vi pritaksas la servan agadon de polaj transportaj entreprenoj (polaj aerlinioj LOT, polaj oceanaj linioj, internacia aŭtomobila transporto PKAES, polaj ŝtataj fervojoj kaj de la turisma oficejo ORBIS)?

Respondo al unu el la supraj demandoj jam rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La respondojn ni petas sendi laŭ jena adreso:

POLSKIE RADIO, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando  
en kovertoj signitaj per la devizo "Konkurso" - ĝis la 31-a de decembro 1976 j. (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncas en la dissendoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro 1977 j. kaj en la marta numero de la revuo "Polska" (Pollando).

Ni deziras bonŝancon en la lotado de la premioj. Partoprenu mem la konkurson kaj partoprenigu aliajn.

POLSKIE RADIO Warszawa

Pola Radio elsendas en Esperanto ĉiutage sur jenaj ondoj:

6,00 - 6,30 horo 41 m, 49 m, 75 m, 200 m

16,00 - 16,55 horo 31 m, 41 m

22,30 - 23,00 horo 49 m, 75 m, 200 m